

VI DEVAS FARI VIAN MORTON PUBLIKA

*curatorial statement translated to Esperanto by Leston Buell
with Renée Mboya, Asep Topan, Jussi Koteila, Nora Barón,
Britt van Groningen and Nicoline van Harskamp*

KRIZO

Pensante pri la ideo de krizo—tio estas, iu ajn okazo kiu kondukas al malstabila kaj danĝera situacio influanta individuon, grupon, komunumon aŭ tutan socion—ni spertas la dinamikon de potencrilatoj, en kiu la signifoj, valoroj kaj kondutoj kiujn socio produktas kaj propagandas per siaj kulturaj formoj kaj praktikoj preskaŭ ĉiam privilegias certajn grupojn malfavore al aliaj. La krizo okazas kiam tiuj kiuj imagis ke ili havis la privilegion perdas la tiel nomatan ‘potencon por fari mondojn’.

En la nunaj situacio kaj kunteksto de la artinstitucioj, oni povas distingi du apartajn krizojn. La unua estas la ĝenerale agnoskita krizo de la burĝaj artinstitucioj kaj ties ekspluatemaj kaj ekskluzivaj strukturoj. La artinstitucioj estiĝis post la Franca Revolucio kiel forumoj por nacia sinkontemplado, aŭ almenaŭ tio estis la utopia promeso kiu rilatas al ili. Tamen ili malsukcesis vastigi la engaĝon de publikoj el malsamaj ekonomiaj klasoj, etnaj devenoj kaj genra identeco; anstataŭ tio ili iĝis spacoj por senbrida sinkontemplado fare de la paroĥismaj burĝaj klasoj. Ne necesas diri ke la artinstitucioj estas en krizostato jam de sia genezo. Tiuj ekskluzivaj premisoj kontestiĝis multmaniere en la 20a jarcento, sed ankoraŭ troviĝas trudiĝemaj strukturoj kiuj daŭre hantas la okcidentajn instituciojn dum tiuj lastaj luktadas kontraŭ la lastatempaj novliberalaj tendencoj en la kultura politiko.

La dua krizo estas ŝajne pli videbla en la nuntempo kiel simptomo de socioj kiuj antaŭe vivis sub la sistemo de la sociala ŝtato. Dum la sofismo de la sociala ŝtato kolapsas—kio okazas post la malkovro ke la aranĝoj kiuj pretendis celi la socialan bonfarton probable estis realigitaj kun la politika intenco dilui la laboristaran agresemon sen enkonduki fundamentajn ŝanĝojn rilatantajn al la distribuo de riĉeco kaj potenco—strukturoj de la okcidentaj institucioj de la 20a jarcento restis plejparte nedifektitaj, kaj dum ili sin turnas al la novliberalaj kaj estraraj forumoj, kun la intenco vastigi sian propran publikon en la pli vastan ĝeneralan publikon sen kompreni iliajn subjektivecojn, ili ne plu povas resti la regno de la burĝaro. Tiun krizon kreis la novliberala sistemo uzante la ekzistantajn strukturojn por gajni pli vastajn publikojn sen kompreni iliajn subjektivecojn kaj ilian strukturan mankon de agkapablo. La publikoj iĝas kvantoj sen konsideri iliajn idiosinkraziojn. Tiurilate, la artinstitucioj tre dependas de ĉi tiu novliberala sistemo por formatoj por daŭripovo kiuj nur utilas por substreki iliajn eventualan nesekurecon kaj ideologiajn difektojn. Ene de la kunteksto de la novliberalismo, ilia komenca tasko evoluigi la demokration malsukcesas, kaj ili eĉ iĝas pli obskuraj, pli malfidindaj kaj pli ekskluzivaj.

Do, eblas lokalizi ĉi tiujn krizojn de malsamaj perspektivoj kaj sur malsamaj terenoj. La okcidenta moderneco kaj ĝiaj kulturaj institucioj formiĝis dum mnemonikaj teknologioj aperis el krizoj kaj iĝis la ĉefaj aparatoj por respondi al krizo. La nuna novliberaligado de la nacia ŝtato kontestis tiujn antaŭajn ideologiajn statusojn kaj rolojn de la artinstitucioj. La okcidentaj burĝaj klasoj perdas sian agadkapablon ene de la artinstitucioj, kaj ankaŭ en pli larĝa senco ene de la demokratiaj institucioj. Traktante la unuan krizon, gravas rigardi la historion de la artinstitucioj kaj la heredaĵon de iliaj strukturoj. La nuna sento de urĝeco ŝajnas pritrakti la duan krizon, kiu havas drastan

efekton sur la maniero en kiu artinstitucioj pensas, agas kaj difinas sian pozicion en rilato kun la publiko kaj la kunteksto. Tiurilate, okazas historia ŝanĝo: artaĵoj kiuj provas uzi la ekspozician spacon kiel ejon por kritiki sociajn malegalecojn, inkluzive tiujn enkorpigatajn en la institucioj kiuj regas la strukturojn kaj iliajn sociajn rolojn, cedas sian lokon al artaĵoj kiuj emfazis la perpleksecojn kiujn daŭrigas la kutimaj ekspozicioprotokoloj sekvataj en artinstitucioj.

KUNPAROLADO

Unu el la ŝlosilaj proponoj de la projekto Vi Devas Fari Vian Morton Publika rilatas al la ideo inviti individuojn kaj komunumojn veni al De Appel, kiel kunparolantoj kaj kunuzantoj de la spaco. La aktivecoj de la projekto ne celas certan publikon aŭ certajn grupojn de homoj sed koncentriĝas en la provado starigi procezojn de kunparolado kun ekzistantaj komunumoj kaj homoj kiuj okupiĝas kaj konversaciadas pri nuntempaj krizokondiĉoj.

Oni povas kompreni la krizon de la nuntempaj artinstitucioj kaj la kondiĉojn en kiuj ili funkcias kiel longigaĵon de la krizo de la eŭropa burĝaro kaj la okcidenta burĝa moderneco. La institucioj ne plu estas sekuraj paradizoj por la aŭtonoma disvolviĝado de la profesiaj interesoj kaj la identeco de la Eŭropa meza klaso. Ne estus senkaŭza aserto diri ke ĉi-momente, pli kaj pli, la burĝa meza klaso malaperas alfrontite de la tutmonda post-Fordisma novliberala reĝimo. Tamen, por multaj tiel nomataj marĝenaj grupoj da homoj la manko de materiala kaj simbola agadkapablo kaj ĝiaj afektaj kaj emociaj sekvoj ne estas nova kondiĉo.

Kunparoli en tiuj instituciaj kondiĉoj necesigas agnoski ke certaj marĝenigitaj grupoj neniam havis agadkapablon ene de institucioj kiel De Appel Arts Center. La kunparolado ne estas provo doni agadkapablon, sed provo esplori diversajn subjektivecojn kaj ekzameni kiel komunumoj difinas sin en rilato al la institucioj kontraŭ kiuj ili emas havi malamikan sintenon. La kunparolado estas la procezo de agnoskado ke ekzistas komunaj emociaj kaj afektaj urĝaĵoj el kiuj oni povas krei solidarecojn, tutdume rekonante la materialajn kaj historiajn diferencojn en kiel la krizoj manifestiĝas kaj kiel oni supervivas ilin.

VI DEVAS FARI VIAN MORTON PUBLIKA

Vi Devas Fari Vian Morton Publika estas titolo inspirita proksime de la labormetodiko de la filmokreisto Chris Kraus. Laŭ ĉi tiu metodiko, oni prenas sin mem kiel esplorobjekton, kiel sian propran ekzemplan kazon, estante unuavice sia plej tuje havebla krudaĵo kaj farante tion sen honto.

Tiamaniere ni provas uzi la biografian metodon por kunstebi larĝan gamon de materialoj—krei personojn kaj skribaĵojn kiu estas verbo, atestanta raporton de la nuna momento. Estas maniero, danĝera maniero, eldiri la neeldireblan nunon, samtempe por kiu ne ekzistas taŭga formo. Formo kiu permesas ajnajn parolantojn plene havi sian propran agadkapablon por paroli. Sed tio ne signifas ke ĝi ne estas eldirebla, sed tute male ke ĝi estas eldirenda. Kaj estas nur uzante la senhontan subjektivecon ke oni povas eldiri ĝin.

Anstataŭ konfeso, ni sugestas sincerecon. La ekzamenado de kiel la ŝajnaj privataĵoj fariĝas publikaj povas funkcii kiel revolucia praktiko; ni provas analizi la uzadon de la privateco kiel ilon per kiu oni povas komenci pensi, skribi kaj partopreni en la mondo pere de artkritiko, politika komento kaj agado. Kiel sincera parolado pri onia propra sperto povas ebligi ĝian abstraktadon? Kiun elirpunkton la memo proponas? Kio estas la sincera parolado proponata al la publiko kaj kial tiu metodo estas grava?

